Gafur Gazizi,

# Alian mondon!

Kun via animo mistera,
lontana,
min ligas fadeno de sento tenera
kaj kuras laŭ ĝi el la koro infana
kurento de mia animo sincera.

Mi skribas al vi la leteron kun ĝojo
ne nur por saluti vin per bona vorto,
sed por inter ni estu ĉiam la vojo
sur ponto liganta la bordon kun bordo.

Mi volas ke nin en la mondo sensenta
kunigu parolo de l' koro al l' koro.
Ne venu al ni la soleco turmenta,
ne ronĝu estinta aŭ nova doloro...

Kun vi, mia kara amiko lontana,
deziras mi loĝi la mondon unikan,
kreitan de mia imago infana,
kaj ĝui en ĝi la feliĉon amikan.

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas Gafur Gazizi.*

*Arg-950-1914 (2013-12-14 16:36:32)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poemon en `http://my.opera.com/poezio/blog/`.*